
ESPERANTO-INFORMILO



Rubrikoj ĉi-numere:

- Programo
- El la klubo
- Esperantujo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Lasta paĝo

Foto: A. Deutsch, en februaro 2023
Burĝantaj galantoj antaŭ ŝtono surkreskita de musko.

La marta eldono de la Esperanto-Infomilo aperas kunredaktita de Georgo (GH) kaj Ulriko (UF). La redaktoteamo deziras bonan legadon.

Kolofono

Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
korektinto: Ulriko Felmano

**Esperanto-Gesellschaft
Frankfurt am Main**

www.esperanto-frankfurt.de
Vorsitzender: Georg Hennemann
georg.hennemann@t-online.de
Rehgartenstr. 16
35683 Dillenburg
Tel. 02771-8196614

Bankverbindung:

Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: DE75 5008 0000 0771 5717 01
BIC: DRESDEFFXXX
bei: Commerzbank Frankfurt

Jahresbeitrag

ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

Programo

Klub-Abende

Klub-vesperoj

Dienstag, d. 7. mar. 23

mardon, la 7-an de mar. 23

19:00 h per Zoom

Offene Sprachrunde

19:00 h per Zoom

Malferma babila rondo

Dienstag, d. 14. Mär. 23

mardon, la 14-an de mar. 23

19:00 h per Zoom

Geschlossene Sprachrunde (nur Mitglieder)

19:00 h per Zoom

Fermita babila rondo (nur klubanoj)

Zoom-Ligilo: <https://zoom.us/j/97497349753?pwd=OTBsMnladnA3UVhuRy9Ta0dYcFNldz09>

surloke:

Saalbau MÜZ Schönhof
Rödelheimer Str. 38
60487 Frankfurt

Dienstag, d. 21. Mär. 23

mardon, la 21-an de mar. 23

18:30 h surloke

18:30 h

Sprachrunde: U. Fellmann

18:30 h

Babila Rondo: U. Fellmann

19:30 h

Vortrag: G. Schäfer

John Howard Griffin

Einige Wochen als ein schwarzer Mann

19:30 h

Prelego: G. Schäfer

John Howard Griffin

Kelkaj semajnoj kiel nigrolo

mardon, la 28-an de mar,23

ekde la 19h horo:

Senprograma samideana babila renkontiĝo

Stattcafé, Gremppstraße 21, 60487 Frankfurt am Main

Naskiĝtagoj


En marto festos sian naskiĝtagon:

06.03 Walter Ullmann
30.03. Bernhard Westerhoff

Ni kore gratulas!

La Homaranismo de Zamenhof en ĝia hodiaŭa percepto kaj pritaksado

Opinia eseo de Georg Hennemann



L.L. Zamenhof desegnis ĉi tiun instruon ĉirkaŭ 1900 kaj publikigis ĝin anonime en broŝuro en 1906 kaj poste en reviziita eldono en 1913 sub sia vera nomo. La Homaranismo de L.L.Zamenhof havas komunajn trajtojn kun la aktuala projekto de ‚Tutmonda Etiko‘ (germane: Weltethos) kies iniciatinto estis la germana teologo Hans Küng. Ĝi estas la formulo de baza aro de etikaj normoj kaj valoroj, kiuj povas esti derivitaj de religiaj, kulturaj kaj, iagrade, ankaŭ de filozofiaj tradicioj de homa historio. La projekto Tutmonda Etiko estas provo priskribi tion, kion la mondaj religioj havas komunan kaj starigi komunan etoson, koncizajn regulojn, konsistantajn el bazaj postuloj, kiujn ĉiuj povas akcepti. Kiel la internacia ‘Tera Ĉarto’-iniciato, la projekto provas formuli la etikajn fundamentojn

por pli humana kaj demokrata monda ordo por, interalie, eviti baldaŭajn ekologiajn katastrofojn. Ankaŭ la esprimo “homa devo” estas ĉefe karakterizita de la Universala Deklaracio de homaj respondecoj. Tiu ĉi deklaro estis publikigita en 1997 lige kun la 50-a datreveno de la Universala deklaro de homaj rajtoj de Unuiĝintaj Nacioj. La deklaro de homaj respondecoj konsistas el preambulo kaj entute 19 artikoloj kiuj priskribas la devojn kiuj devus esti truditaj al ĉiuj homoj. Resumiĝas ĉion en la ora regulo: Ne faru al aliaj tion, kion vi ne volas, ke iu faru al vi.



Sed tiuj reguloj kaj deklarioj, projektoj, la Homaranismo kaj similaj pseudo-religiaj instruoj, ĉu ĉiuj tiuj estas vere iu alia ol la malnovaj bibliaj dek ordonoj? Aŭ ĉu principe la sama nur en alia nun pli aktuala pakumo? La enhavo de tiuj instruoj ne vere montras iun kvalitan novan. „Ĉiu, kiu memorigas nin pri homaj devoj hodiaŭ, ne povas eviti enspiron de biblia monoteismo. Ĉar ĝuste ĉi tie la homaj devoj ricevis sian religian ŝarĝon: en la konfrontiĝo inter Dio kaj homo. Ja, laŭ Assmann¹, la homaj devoj estas nenio alia ol la

¹ Der Heidelberger Ägyptologe, Religions- und Kulturwissenschaftler Jan Assmann

ordonoj de Dio. Kaj ĉiu, kiu malobservas ilin, pekas kontraŭ Dio kaj la tuta kreitaro". La projekto "Tutmoda Etiko" kaj la deklaro de homaj respondecoj estas kritikata por esti ankoraŭ tro eŭropeca, okcidenteca kaj ne konsideras aliajn normojn kaj valorojn. Do la demando restas: Ĉu indas „desegni“ universalajn deklarojn kiam ŝajnas ke neniu homo, socio aŭ ŝtato sekvas ilin. Estas ja boncele verki kaj publiki statutojn humanecajn, gvidliniojn, agmanierojn ktp.. Sed ĉu la homaro vere plibonigeblas per tiuj ordonoj? Mi pensas ke ne kaj ke tiuj ordonoj tute ne taŭgas por ŝanĝi la situacion antaŭ la homaro nun staras. La homa specio ne ŝanĝigeblas. Nur ĉiu individuo pliedukeblas. Kaj pro tiu baza aserto kun intereso mi legis libron de aŭstrala biologo Jeremy Griffith, kiu ja priskribas la evoluon de la homaro ekde antaŭ du milionoj jaroj kiam saltege evoluis la cerbo de la hominidoj kaj poste establis kreskanta permanenta batalo inter niaj genetike hereditaj instinktoj kaj nia nova kaj senprecedenta nervara cerba konscio - kaj tielmaniere li klarigas la „humanan kondiĉon“ en lia libro „Transformu vian vivon kaj savu la mondon“. Do ĉirkaŭ cent jarojn post la publikado de la etika instruo de Zamenhof pri Homaranismo tiu nova verko unuafoje klarigas en komprenebla maniero kial la homaro kaj ĉiu homo ĝis hodiaŭ agas tiel aĉa kaj konfuzita. Estas nia nescio, ke en iama prastato niaj prapatroj kondukis bone kaj ke ni tute ne havas malbonajn egoismajn genojn² aŭ instinktojn. Estas la neado de nia propra psiko kiu malhelpas komprenon de nia humana kondiĉo kaj kaŭzas nian konfuzegon. Do por nia malkonfuzado ni ĉiuj urĝe bezonas plian klarigadon kaj edukadon kaj certe ankoraŭ daŭras jardekojn ĝis tiu scio pri nia humana kondiĉo estas akceptata kaj la bariero en niaj kapoj finfine estas venkita. Laŭ mia opinio la aŭtoro Jeremy Griffith pritraktas kvazaŭ la saman temon el alia perspektivo kiun R.M. Rilke priskribas en sia poemo „Arkaika torso de Apolono" kies du lastaj frazoj tekstas jene: "...

² Griffith, kiu dediĉis sian vivverkon al analizado de la biologiaj kialoj de nia psikoza stato, klarigas kial tradiciaj sciencistoj, kiel Dawkins, ĝis nun, havis

ĉar ne estas loko kiu ne vidas vin. **Vi devas ŝanĝi vian vivon**" kaj kion la germana filosofo [Peter Sloterdijk](#) transprenis por sia samnoma verko kun subtitolo "Pri antropotekniko". Tiu frazo por li estas la resumo, escenco de ĉiuj religiaj instruoj, ekzercoinstrukcioj kaj trejnkursoj kiuj montras homojn en iliaj "vertikalaj streĉitecoj" kaj memorigas ilin pri iliaj eblecoj kreski preter si mem kaj finfine trejni "kun Dio(j)". Ĉu Zamenhof subtenus ĉi tiujn asertojn se li ilin konus? Mi konvinkatas ke jes.



neniun elekton ol aserti, ke homoj estas egoismaj kun sovaĝaj bestaj instinktoj.

Plano por la rekatalogado kaj revivigo de la kluba biblioteko

Eseo de Rubeno Fernandez Asensio

En la pasinta Januara numero mi proponis strategion por komenci la katalogadon de la kluba biblioteko, kiu kovris la unuan paŝon: bibliografia priskribo. En ĉi tiu artikolo mi daŭrigos pritraktante la lastan parton de la laboro, kiun Ana Manero difinis ĉi tiel:

3. Doni la bezonatajn indikojn por trovi la originalan dokumenton ene de la kolekto.

La kerno de la afero estas pli simpla ol ŝajnas sugesti ĉi tiu klera kaj faka vortumo: temas pri la demando, kiel trovi la librojn mem sur la bretoj. Por ataki la problemon, ni pensu pri niaj personaj, privataj librokolektaĵoj. Plej multaj individuaj libroposedantoj ne havas katalogon aŭ indekson por siaj kolektaĵoj, sed kutime bone memoras kiujn librojn ili havas, ĉar ĉiujn mem aĉetis aŭ akiris. Nia memoro estas kvazaŭ bibliografio registrita per Zotero kian mi prezentis en la pasinta monato, sen preciza indiko pri la situo de ĉiu libro en difinita biblioteko.

Malgraŭ manko de katalogo, ni ĉiuj rapide trovas niajn librojn, ĉar homoj estas naturaj klasifikantoj kaj amas kunigi similan kun simila. Biblioteka klasifiko de privata kolektaĵo ne estas scienco sed havas nur praktikan celon, gvidatan de la principo “dividu kaj konkeru”: oni dividu la tuton en kiom eble malgrandajn kaj memevidentajn kategoriojn por rapide trovi la serĉatan libron. Tial, la serĉeblaj kategorioj havu kiel eble similan grandecon: ne helpas se kelkajn kategoriojn reprezentas nur kelkaj libroj dum aliaj kategorioj okupas plurajn bretojn; en tiaj kazoj necesas plu subdividi la pli grandajn kategoriojn ĝis oni atingas uzeblan malgrandecon, tiel ke sufiĉu unu rapida okulumo por trovi la celatan libron. Kutime tio estas duonmetro, maksimume unu metro; se la kategorio pli longas, jam necesas iu interna ordigo (alfabeta, aŭ kia ajn) por trovi ion ajn en ĝi. En la biblioteko de la Interkultura Centro Herzberg, ekzemple, la libroj estas pli malpli aranĝitaj laŭ temoj, sed ĉar la bretoj estas longaj, oni decidis aranĝi la librojn sur ĉiu breto... laŭ alteco kaj dikeco! Se oni ne volas

Dua Parto

algui etikedojn al la libroj, kiel okazas en ICH, necesas esti ĉi tiel inventema. Estas ankaŭ homoj, kiuj ordigas laŭ koloroj... Ĉiukaze ni memoru, ke kutime klasifiko sola ne sufiĉas, kaj necesas kombini ĝin kun ordigo; ili estas malsamaj kaj distingendaj konceptoj.

Profesiaj bibliotekoj uzas diversajn klasifikojn, inter kiuj la plej konataj estas la Dewey-Klasifiko kaj la Universala Dekuma Klasifiko. Ili estis kreitaj por grandaj ĝeneralaj bibliotekoj kaj sekve ĝiaj kategorioj estas senfine subdivideblaj por ke ordigo estu preskaŭ nenecesa. Ĉar “universaleco” tre logas esperantistojn, esperantaj bibliotekoj ofte uzas UDK-on, precize en la esperantigita versio de Montagu Butler. Tamen ĝi prezentas plurajn malavantaĝojn. Unue, ĉar ordigo preskaŭ forestas, ne sufiĉas etikedi breton aŭ parton de breto: ĉiu libro devas havi sian etiketon kiu montru ĝian kategorion, kvankam multaj libroj en tipa esperanta biblioteko estas fakte broŝuroj kun tro maldika spino por ke etikedo estu legebla. Due, malgraŭ sia nomo, UDK ne estas tiom universala, ĉar multe ŝanĝiĝis laŭ la tempo. La katalunaj bibliotekoj, ekzemple, uzas version bazitan sur la UDK-eldono de 1918, dum la esperantigo de Butler estas bazita sur la eldono de 1950; sekve, kvankam la plej ĝeneralaj kaj vastaj klasoj de la UDK ne ŝanĝiĝis, la detaloj ofte ne korespondas, sed bibliotekoj ne povas ĝisdatigi sian uzon de UDK ĉar tio postulus periodan ŝanĝon de milionoj da etikedoj kaj katalogaj rikordoj. Tial ĉiu UDK-biblioteko restas fosiliiginta ĉe la UDK-eldono elektita en la tempo de ĝia fondiĝo, kaj sama libro povas havi sufiĉe malsaman klasifikon kaj etiketon en malsamaj bibliotekoj. Estas kvazaŭ paroli la originalan Volapukon de Martin Schleyer aŭ la reformitan de Arie de Jong, aŭ la originalan Idon de la Delegitaro (1907) kontraŭ la lastaj reformitaj versioj. Trie, nesimpligita UDK estas tro detala. Ekzemple, en la klasifiko de Butler, la kodo “E 533.211” signifas “Esperanta frazanalizo: objekto nereкта (prepozitivo); rekta : nereкта (ofte ambaŭ eblas)”, kvankam eĉ en

granda, faka biblioteko malfacile trovblos monografio tute dediĉita al tiom preciza temo. Tiom fakaj tekstoj kutime estas mallongaj kaj kolektitaj en plurtemaj volumoj; fakte ankaŭ dokumentistoj ofte uzas UDK-on por priskribi artikolojn de fakaj revuoj en bibliografioj. Kiel videblas per ĉi tiu ekzemplo, UDK tro komplikas la taskon katalogi librojn kaj produkti etiketojn. Laste sed ne balaste kaj plej grave, la revo de antaŭmilitaj bibliotekistoj, ke la tuta mondo lernos UDK-on, neniam realiĝis; ankoraŭ nun, plej multaj vizitantoj de biblioteko bezonas helpon de bibliotekistoj por “traduki” signaturon el la katalogo al preciza lokiĝo sur la bretoj kaj por trovi la bretaron pli konvenan al iliaj interesoj. Indas do uzi pli simplan kaj lerneblan sistemon.

Se UDK similas al aprioraj planlingvoj kiel Solresol aŭ la filozofia lingvo de John Wilkins, kiuj klasifikis la mondon tiel ke ĉiu vorto difinis sin mem, eblas ankaŭ aposteriora aliro al la problemo pri klasifiko, same kiel Zamenhof uzis jam ekzistantan trezoron de internaciaj vortoj anstataŭ krei tute novan vortprovizon. Kvankam individuaj interesoj estas tre malsamaj kaj do privataj kolektaĵoj multe diferencas, bone provizita kluba biblioteko devus respeguli la staton de movadaj libroservoj kaj de la esperanta libromerkato, kiuj siavice respegulas la tradiciojn kaj ĝeneralajn interesojn de la esperantistaro. Dum multaj temoj komplete forestas en la esperanta eldonado, ekzistas aliaj “tipaj” esperantaj temoj (ekzemple spiritismo). Teorie eĉ eblus statistike kaj science analizi katalogon de granda esperanta libroservo aŭ biblioteko por eltrovi klasifikon kiu nature dividi ĝin en plej similgrandajn kategoriojn. Alia ebleco pli simpla estas kopii la klasifikon de jam funkcia biblioteko, ekzemple la klasifikon de la biblioteka klubo en Hamburgo, kiun la respondeculoj de la komuna katalogo de Germana Esperanto Asocio rekomendas al aliaj kluboj. Ĝi konsistas el 22 kategorioj, kies nomoj kaj difinoj estas diskutablaj, sed pli gravas la nombro: precize 22 kaj ne 10, aŭ 100, aŭ 1000, kiel okazas kiam oni uzas UDK-on ĝis la unua, dua aŭ tria subdivido. Imagante mezgrandan bibliotekon el 2000 libroj, kaj supozante (tamen granda supozo) ke la klasifiko nature produktas

egalgrandajn dividojn, ĉiu kategorio inkluzivus ĉirkaŭ 100 librojn, kaj se averaĝa libro dikas 1 centimetron ĉiu kategorio longus unu metron, sufiĉe malmulte por ordigi ĝin alfabete sen plua subdivido. Plie, klasifiko kun nur 22 kategorioj estas multe pli lernebla ol alia kun 100 aŭ 1000, kaj por katalogantoj kaj por uzantoj.

Ĝis ĉi tie mi skribis laŭ la antaŭsupozita aksiomo, ke biblioteko nepre bezonas klasifikon. Ja tiel estas, se ni celas ne nur faciligi trovon de konata kaj serĉata libro el mensa aŭ skribita katalogo, sed multe pli la malkovron de nekonataj libroj kies temo kongruas al niaj interesoj. Tia speco de senfokusa aŭ, kiel dirus anglalingvanoj, “serendipa” serĉo estas multe pli ofta ol la alia speco en publikaj bibliotekoj, kaj postulas rektan aliron de la uzanto al la librobretoj. Tamen tia aliro estas malfacila en klubaj bibliotekoj pro mallongaj malfermhoroj, kaj praktike neebla en la kazo de la libroj en Saalbau, kiuj estas ŝlositaj en ŝrankoj, en ŝlosita ĉambro en ŝlosita domo. Ĝuste tial mi skribis la pasintan monaton, ke interreta katalogo estas la unua nepre kontentigenda bezono por revigligo de la biblioteko. Tial, malgraŭ la ĝenerala antaŭjuĝo, klasifiko ne estas vere bezonata en tia biblioteko, ĉar fokusita serĉado ne postulas laŭteman klasifikon sed nur ordigon. Sufiĉas ke la katalogo donu unikan numeron aŭ kodon al ĉiu libro, sen neceso ke tiu kodo mem havu signifon.

Plie, uzo de laŭtemaj klasifikoj por aranĝo de libroj sur bretoj havas malavantaĝojn. Unue, neniuj klasifikoj estas tiaj, ke oni ne trovos elementojn kiuj kontentigas la difinojn de pluraj kategorioj; ekzemple, ĉina ilustrita infanlibro povus trovi lokon inter aliaj infanlibroj aŭ inter libroj rilatantaj al Ĉinio, sed ne eblas meti ĝin sur du bretojn kaj necesas elekti, foje arbitre. Eĉ kiam katalogantoj atingas sisteman kohercon en sia kompreno kaj apliko de la klasifiko, restas al la uzantoj la tasko ellerni tiun sistemecon kaj la eterna dubo, ĉu ili serĉas sur la ĝusta breto. Due, klasifika aranĝo ne permesas plej efike uzi la bretojn, ĉar devas lasi libera iom da spaco ĉe la fino de ĉiu kategorio; alie, kiam nova libro estus aldonata, necesus flankenŝovi la librojn de ĉiuj postaj kategorioj, unu post la alia. Trie, laŭtema klasifiko miksas librojn kaj broŝurojn de

diversaj grandecoj, el kiuj multaj ne povas mem stari sen apogo sur la apudaj; tial publikaj bibliotekoj bezonas specialajn multekostajn bretarojn kun specialaj libr-apogiloj kiuj kunpremas ĉiun librovicon por ke ĝi ne difalu. Tamen spacomanko estas tipa problemo de esperantaj bibliotekoj kiu akriĝas kiam la kolektaĵo kreskas. Tial la Germana Esperanto-Biblioteko en Aleno, kiu estis organizita en 1989 laŭ la Butler-a klasifiko, en 2004 adoptis la sistemon de "numerus currens" aŭ kuranta numero, tio estas: ĉiuj nove akiritaj libroj estas de tiam en vicigataj unu post la alia sur la bretoj laŭ ordo de akiro kaj sendepende de ilia temo aŭ enhavo; tiel, anstataŭ batali multkapan hidron, oni alfrontas unu longan vicon kiu kreskas nur je unu ekstremo kvazaŭ serpento, okupante unu breton post la alia.

Ordigo laŭ kuranta numero sen klasifiko estas multe pli praktika por bibliotekoj ne rekte alireblaj al la publiko sen rekta enlaso de la bibliotekisto, kia estas GEB; tial ĝi ankaŭ taŭgus en Frankfurto. Plej efikan uzadon de la spaco ĝi atingas ne nur per forigo de spacoj, sed ankaŭ ĉar permesas apartigi la volumojn laŭ grandeco sur malsamaj bretoj. En GEB, ekzemple, estas du grandecoj, tiel ke la signaturo "18B24" indikas la 24an grand-formatan (B) libron akiritan en la jaro 2018. Tiu ĉi sistemo ankaŭ favoras konservadon, ĉar ebligas apartigi delikatajn, rompiĝemajn broŝurojn por ke ili ne estu kunpuŝataj kaj dispremataj inter pli grandaj libroj.

Legantoj eble plendos kun bedaŭro, ke tia biblioteko ne estos explorebla por hazarda kaj bonŝanca (t. e. "serendipa") malkovro. Certe ne rekte kaj fizike. Tamen ne necesas rezigni la eblecon de tia senfokusa serĉado: sufiĉas delegi tiun taskon al la elektronika katalogo mem anstataŭ al la surbreta aranĝo, tiel ke la katalogo proponu "virtualajn bretojn". Tiu estos la temo de la tria kaj lasta parto de ĉi tiu artikol-serio. Antaŭ ol fini, ni reviziu kiel Zotero povas helpi al ordigo de kolektaĵo. Ĝia datenbanko havas plurajn kampojn kiujn eblas utiligi por tiaj celoj: aldondato, arĥivo, situo en arĥivo, katalogo, kaj kataloga signaturo. Kvankam ĝi ne havas difinitan kampon por alteco aŭ dimensioj de libro kiel postulas katalogaj normoj, eblas

reutiligi la kampon "ekstra informo". Ĉiuj tiuj kampoj estas videbligeblaj kaj uzeblaj por aŭtomate ordigi la liston de libroj numere kaj alfabete. Ankaŭ tiurilate do, ĝi estas kontentige uzebla.

--

Ŝerco (sendita de Gundhild):

Studento pri medicino estis en la ekzameno. La ekzamenanto demandis lin, kiujn ŝvitigajn rimedojn li konis. La studento nomis ĉiujn, kiujn li memoris. La ekzamenanto diris: - „Kion vi farus, se tiuj-ĉi rimedoj ne helpas?“ - „Mi sendus la pacienton al vi en la ekzamenon.“

Proverbo de la monato

La proverbo, kiun mi ĉifoje prezentas estas

Eĉ malsaĝulon sperto instruos

Tiun proverbon mi elektis pro la pli ol unu jaron daŭriganta milito en Ukrainio. Laŭ mi tiu proverbo bone klarigas ke historiaj faktoj evidente ne instruas la homaron sufiĉe fundece kaj ke pro tio ĉiu generacio devas fari sian proprajn ŝtultaĵojn, erarojn kaj spertojn - eĉ se temas pri milito.

Enigmo(j) (sendita de Ulriko)

La last-ei-an enigmon solvis pluraj personoj, i.a. Frank, Gundhild sendis la ĝustan nomon al mi, estis - Hanna

Jen nova enigmo por vi:

Kiu el la sekvaj vortoj ne apartenas al la tuta vortgrupo:

aerumi, agaco, akvomelono, baldakeno, barĉo, biero, bismuto, dando, eksplodi, Elizabeto, konscienco, lavango, lekcio, Ludovik', prujno, reprezentĵi, rezultato, Sofio, sofismo, vaflo.

Solvo de la enigmo el la antaŭlasta informilo:

Mi koncedas, ke ĝi estis iom malpli facila ol la lasta. Ĉar neniu sendis solvon, malgraŭ la plilongigo de la solvotempo, mi hodiaŭ ne nur malkaŝu la solvon, sed ripetu la enigmon, por ke neniu devas serĉi la antaŭlastan ei. Jen la enigmo:

```
BONAN
+ TAGON
-----
SALUTO
```

Kaj mi demandis: "Ĉu vi scias kiel adicii? Ĉiu litero en ĝi estas anstataŭigebla per unu el la ciferoj 0...9, ĉiu cifero ĉiam per la sama litero. BONAN do reprezentas 5-ciferan nombron. La tria kaj kvina ciferoj estas samaj. La dua cifereco de la dua nombro, TAGON, estas la sama kiel la kvara en BONAN. SALUTO estas la sencifera rezulto, la sumo de la du supraj nombroj. Bonvolu ciferigi la kalkulon."

Jen la solvo:

```
  4 6 3 2 3
+ 8 2 7 6 3
-----
 1 2 9 0 8 6
```


Invito al tagmanĝo (De Felmano Ulriko)

Kapitano! Ili invitis nin! La revenanta skipo ankoraŭ estis cent metrojn for, sed ili aŭdis Lovreon bone, li ja kriis.

La skipanoj estis elĉerpitaj de la longdaŭra intensa ĉasado, ili do ne rekriis, sed sciemis silente.

Kiam ili preskaŭ estis je la pordego al la eta fortikita setlejo, la kapitano demandis: kiu? Ĉu la buntruĝuloj?

Jes, diris Svenjo, kiuj aliaj homoj ĉi-tie troviĝas?

Ili kune eniris, kaj post disdono de la ĉasitaĵo al Klingspor' kaj Buto, kiuj sur la ŝipo estis la kuiristoj, la ceteruloj kunsidiĝis sub la granda palma ombrelo, la kutima babilejo.

Rakontu! Ili venis, eble horon post via deiro. Sesope, sed ni enlasis nur du. Babilado estis malfacila, ili scias iomete la francan, de iamaj kolonistoj, kiuj ŝajne iam ĉi-tie loĝis, kiel ni, kaj kun kiuj ili starigis komercon pri kelkaj varoj. Sed post kelkaj jaroj, tiuj pluvojaĝis.

Ĉu vi scipovas la francan!

Iomete, kaj fuŝe.

Kaj?

Jes ja, nu... mi komprenis, ke ili morgaŭ okazigos feston, kaj nin invitis.

Por kio?

Ili volas starigi kontakton, kaj komercon, kiel al la tiamaj francoj.

Kiel tiu funkciis?

La buntruĝuloj donis diversajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn el plantsukoj, mi komprenis.

Ĉu alkoholecaj?

Ankaŭ. Kaj iuj specialaj fungoj estis...

Kion ili ricevis de la francoj?

Miakomprene, metalajn ilojn, kestojn, botelojn, muzikinstrum...

Botelojn? Ĉu kun vino?

Ne, simple nur botelojn. Vitraĵon ili ne mem povas produkti, ne konis.

Sed ni ne havas tiaĵojn... kaj la raraj iloj, kiujn ni havas, estas bezonataj de ni mem.

Jes. Nu, ni trovu ion. Ni ja scias multe, kompare al ili. Povas eble konstrui ion el ligno kio impresas ilin.

Do, kiam precize okazos tiu festo, kion ili atendas de ni?

Sekvatage ili estis bonvenigitaj en la vilaĝo, multaj buntruĝuloj venis, kriis, ridis, pri la paluloj en strangaj vestoj. La estro kun imponaj korppentraĵoj salutis ilin en stranga franca lingvo, kiun la kapitano tamen komprenis bone, kaj respondis ĝentile. Kelkajn minutojn poste ili kunsidis sur granda, festene ornamita placo. Oni povis senti odorojn de spicoj kaj legomoj, kaj de fajro, certe por prepari viandon. Oni donis al ili dolĉan strange pipretan trinkaĵon. Post iam da tempo la kapitano jam rimarkis la efekton de eta delirado, kaj li demandis la ĉefon de iliaj gastigantoj:

Kiam venos la manĝaĵo? Mi jam preskaŭ ebrias, kaj estas manĝema!

La vilaĝestro ridetis, respondis: kiam la gastoj venis!

La kapitano miretis, kial atendi plu, ili ja jam ĉeestis nun jam horo, ĉu venos pliaj gastoj?

Pliaj ne, mankas tamen ankoraŭ la gastoj.

Kiel tiel, demandis la kapitano, kiu jam havis malfacilon klare pensi. Nelogikas! Ni jam ĉeestas, sed vi ion aŭ iun ankoraŭ atendas.

Jes, la gastojn.

Sed - kiujn gastojn? Ĉu ni ne estas la gastoj?

Vi ne estas la gastoj, embarasite respondis la ĉefo, vi estas la manĝaĵo!